

informilo por interlingvistoj

ipi

28-a jaro (tria serio) | n-ro 106 (1/2019) | ISSN 1385-2191

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)
kaj Esperantic Studies Foundation (ESF)

Enhavo

1. Antaŭparolo	2
2. Lastatempaj publikigaĵoj	2
Libroj	2
Revuoj	3
Artikoloj ktp.	4
3. La biblioteko de la Universitato Princeton arigas kolekton pri Esperanto kaj interlingvistiko	4
4. Konferenco pri Lingvoj kaj la Unua Mondmilito	5
5. Sukcese okazis ronda tablo pri Esperanto	5
6. Tria Kongreso DiscourseNet DNC3-ALED: Alvoko pri sesiaj proponoj.	6
7. Voko por referaĵoj: multlingvaj literaturoj.....	6
8. Studraporta kunsido de Japana Esperanto-Instituto	7
9. Kunveno de Israela Tradukista Asocio plene dediĉita al Esperanto	7
10. Prof. Ilona Koutny ricevis la 16an FAME-Premion	7
11. Dek jaroj da Esperanto en filozofia fakultato de Zagrebo	8
12. Esperanto-kurso en la Universitato de Kostariko	8
13. Premioj de Fondaĵo Antoni Grabowski	8
14. Parolado TEDx (Romo, 2018) pri Esperanto.....	9
15. Katalogo de Esperantaĵoj haveblas rete	9
16. 50 jaroj da elstara agado: honorigo de ESF.....	9
17. ESF nomis novan kunordiganton de universitataj aferoj.....	10
18. ESF kunvenigis simpozion pri Esperanto kaj interlingvistiko	10
19. ILEI raportas	10
20. Por deca hejmo de DEC – Dokumenta Esperanto-Centro en Zagrebo	12
21. Sugestoj por universitata tezo serĉataj.....	12
22. Stipendioj de ESF.....	12
Festlibro Por Ulrich Lins: Detala Enhavo	12
Bibliografio de la verkoj de D-ro Ulrich Lins.....	14
Enhavtabelo: Pri Esperantaj vortoj - kun humuro kaj serioze.	21

1. Antaŭparolo

Same kiel la antaŭaj numeroj, ĉi tiu numero de *Informilo por Interlingvistoj* kovras grandan diversecon de novaj eldonaĵoj, estontaj aranĝoj, raportoj pri lastatempaj konferencoj, kaj aliaj informoj. Plejparte, ĝia enhavo similas al la enhavo de ĝia nova anglalingva eldono, *Information for Interlinguists*. Se vi ŝatus regule ricevi unu aŭ ambaŭ el tiuj ĉi eldonaĵoj kaj ne jam troviĝas en nia dissendolisto, sciigu nin (ipi@esperantic.org). Kiam aperos nova numero, ni informos vin pri tio, sendante al vi ligilon al la koncerna paĝo en la retejo de ESF (esperantic.org). Nepre sendu al ni viajn novaĵojn pri lastatempaj publikigaĵoj, konferencoj, estonta aranĝoj ktp.!

La redaktoroj (Humphrey Tonkin, Ĵenja Amis, Angela Tellier)

2. Lastatempaj publikigaĵoj

Libroj

Gotoo Hitosi, José Antonio Vergara, Kimura Goro Christoph (Red.). *En la mondon venis nova lingvo. Festlibro por la 75-jariĝo de Ulrich Lins*. New York: Mondial, 2018, 700p.

Kontribuaĵoj de kolegoj kaj amikoj de D-ro Ulrich Lins okaze de lia 75-a datreveno. Okupiĝante pri la akademia interŝanĝo inter Germanio kaj aliaj landoj kaj laborante en Tokio sume ĉirkaŭ dek jarojn, d-ro Lins aktivadis en sia profesia kariero interalie por ligi okcidenton orienton. Estante doktoro pri moderna historio, li estas sendube la plej elstara figuro en la esplorado de la historio de la Esperanto-movado. Lia ĉefverko, *La Danĝera Lingvo*, aperis en pluraj versioj foje kun funda reverkado de la teksto kaj estis tradukita en pluraj naciaj lingvoj. <https://www.amazon.com/Mondon-Lingvo-Festlibro-75-Jari%C4%9Do- Esperanto/dp/1595693785> Vidu la detalan enhavon fine de tiu ĉi numero.

Alvino E. Fantini. *Intercultural Communicative Competence in Educational Exchange. A Multinational Perspective*. Routledge, 2018. 338 pages | 32 B/W Illus.

Alvino E. Fantini estas emerita profesoro, SIT Graduate Institute. La libro rilatas al eduka interŝanĝo kaj eksterlanda studado kaj enhavas du gravajn esplorprojektojn kiuj pristudas la karakteron de interkultura komunika kompetento (ICC), ĝia evoluo dum interkultura interŝanĝado (someraj, mallongdaŭraj kaj semestraj programoj) kaj la efiko de tiuj spertoj en la vivo de eksstudentoj ĝis 20 jarojn poste.

<https://www.routledge.com/Intercultural-Communicative-Competence-in-Educational-Exchange-A-Multinational/Fantini/p/book/9780815369677>

Peter A. Kraus k François Grin, red. *The Politics of Multilingualism. Europeanisation, globalisation and linguistic governance*. Studies in World Language Problems, 6. Amsterdam: John Benjamins, 2018. xix, 367 pp. Broŝ: ISBN 9789027201362 | EUR 99.00 | USD 149.00. e-libro: ISBN 9789027263612 | EUR 99.00 | USD 149.00. <https://doi.org/10.1075/wlp.6>

Multdisciplina pritakso de la efiko de kompleksa diverseco en lingvopolitiko, kiu analizas la interagon de heredaĵoj el pasinteco kun defioj de la nuntempo. La ĉefa fokuso de la libro estas la interrilato de multlingvismo unuflanke kaj la dinamiko de transnaciismo, tutmondiĝo kaj eŭropiĝo aliflanke. Tiu interrilato prezentas senprecedencajn demandojn al nuntempaj socioj dum ili frontas la neceson lukti kun daŭre pli variaj kaj ĉie aperantaj manifestiĝoj de lingva kaj kultura diverseco. La nuna volumo evoluigas integran aliron kiu identigas la nuntempe ŝlosilajn sociajn kaj politikajn dimensiojn,

proponante freŝan kontribuon al la daŭranta konversacio pri la manifestiĝoj kaj mastrumado de multlingvismo.

Aleksandro S. Melnikov. *Pri Esperantaj vortoj - kun humuro kaj serioze*. Rostov-na-Donu: eldonejo Mini-Tajp, 2018, 208 p., ilus. Aĉeteblas ĉe la aŭtoro aleks-meln@mail.ru kaj ĉe UEA. *Vidu la detalan enhavon fine de tiu ĉi numero*.

Aziaz kontribuoj al esperantologio. Aktoj de la 30-a Esperantologia Konferenco en la 92-a Universala Kongreso de Esperanto, Jokohamo 2007. Rotterdam: UEA, 2008. 61p.

McEntee-Atalianis, L. J. *Identity in Applied Linguistics Research*. London: Bloomsbury Academic. 2018. <https://bloomsbury.com/uk/identity-in-applied-linguistics-research-9781623564667/>

Ĉi tiu libro proponas ampleksan esploron pri la historia kaj la nuntempa pritrakto de identeco en diversaj branĉoj de Aplikata Lingvistiko, identigante komunajn temojn kaj terenojn por estonta esplorado. La libro esploras teoriajn kaj metodologiajn alirojn kaj proponas plurajn kaz-studojn. La libro prezentas ne nur aktualajn debatojn en aplikata lingvistiko kaj rilataj kampoj, sed ankaŭ teoriajn kaj praktikajn sekvojn de la studoj pri la identeco el diversaj perspektivoj kaj disciplinaj aliroj.

Revuoj

Literatura Foiro 295, oktobro 2018. Informo de la redakcio:

Estas presata la oktobra numero (295) de la revuo *Literatura Foiro*, redaktata en Eŭropo kun valoraj kontribuoj ankaŭ el aliaj kontinentoj. Krom la akurateco, rimarkindaj estas la femina partopreno, la kreskinta paĝokvanto, la grafiko kaj evidente la enhavo. La kovrilo (ellaborita de Gábor Deák) anoncas la ĉefartikolon, dediĉitan al *La Tragedio de l' Homo*, en la serio de niaj ĉefverkoj en la traduka ĝenro: Giorgio Silfer eseeas pri la dramo de Imre Madách, la du tradukoj de Kalocsay (kun filologia komparo), la najbara verko de Baghy, la influo al niaj literatoroj, de Szathmári ĝis Auld. Alia eseo, de Fernando Pita, kupliĝas al la temaro, analizante la rilatojn inter tradukado kaj lingvistiko. Prozan specimenon el alia lingvo liveras Zlatoje Martinov per *Kainurbo* de la serba Nenad Petroviĉ, kaj Vejdo per fragmento el romano de la ĉina Shen Chong Wen. Originalan rakonton "Ora Cervo" proponas Julian Modest kaj per la krokizo "Salono por frenezuloj" debutas en LF Giuseppe Campolo. Poezie kontribuis Raita Pyhälä, Tiberio Madonna, Zlatko Tišljari kaj Ivaniĉka Maĝarova. Ne nur poetoj: Ana Velasco invitas al socia artikolo "La mizera nupto de Tánatos kaj Eros", Perla Martinelli recenzas la britan filmon "Sufragetoj". Abundas librecenzoj: la plej gravaj el la plumoj de Carlo Minnaja pri poemaro de Miguel Fernandez, de Gonçalo Neves pri *Aliroj al Esperanto*, de Giorgio Silfer pri *Historio de UEA*. Pri nia historio intervenas ankaŭ Nicola Minnaja per danteska komentario kaj Davide Astori per eseo pri René de Saussure.

Ne mankas paĝoj pri jubileoj: pri la fino de la unua mondmilito antaŭ cent jaroj (Wally du Temple kaj Rex Murphy) kaj pri la forpaso de Tibor Sekelj antaŭ tridek jaroj (Djordje Dragojloviĉ). Vi trovos valorajn informojn pri la kultura vivo en Esperantio, ne legeblajn en movadaj gazetoj, kaj epiloge eĉ polemikan leteron de Vinko Ošlak pri artikolo de Marie-France Conde Rey inspirita de Simone Veil.

Artikoloj ktp.

Nova kaj ampleksa artikolo de Alan Libert pri "Artificial Languages" (artefaritaj lingvoj) aldoniĝis al Oxford Research Encyclopedia on Linguistics:
<http://linguistics.oxfordre.com/view/10.1093/acrefore/9780199384655.001.0001/acrefore-9780199384655-e-11?rskey=8Oftjd&result=1>

Recenzo de la traduko de *Kroata noktlibro* de Štimec:

<https://jewishcurrents.org/review/war-in-the-language-of-hope/>

Alcalde, Javier. Linguistic Justice: An Interdisciplinary Overview of the Literature (July 1, 2015). *Amsterdam Working Papers in Multilingualism* #3. 2015, 27-96. Havebla ĉe SSRN:
<https://ssrn.com/abstract=2630104> aŭ <http://dx.doi.org/10.2139/ssrn.2630104>

La raporto celas doni interdisciplinan analizon superrigardon al la nocio de "lingva justeco" kaj pli ĝenerale al justeco en multlingvaj kunteksto. Ĝi plej forte fokusigas je politika filozofio, sed ĝi ankaŭ prezentas plurajn kontribuojn el ekonomiko, socilingvistiko, interlingvistiko kaj juro. La celo de la raporto estas nek pritraksi la internan konsekvencecon de alternativaj (ofte kontrastaj) teorioj, nek peni trovi komunan grundon inter ili. Ĝia celo estas emfazi la politikajn rekomendojn kiuj fontas el diversaj aliroj. La raporto ankaŭ pridiskutas kiel diversaj teorioj aŭ aliroj al lingva justeco aplikiĝis al la kazo de la mastrumado de multlingvismo en la Eŭropa Unio. La eldono estis subvenciita de ESF.

Brosch, Cyril k Fiedler, Sabine. (2018). Esperanto and Linguistic Justice: An Empirical Response to Sceptics: Economic, Philosophical and Sociolinguistic Approaches. 499-536. 10.1007/978-3-319-75263-1_17. <https://www.researchgate.net/publication/327397175>

Tiuj kiuj skeptikas pri la internacia planlingvo Esperanto lastatempe levis demandojn pri ĝia neŭtraleco kaj simpleco. Interalie, ili prognozas, ke, se Esperanto larĝe disvastiĝus, la nombro de denaskaj parolantoj grandege kreskus kaj la planlingvo fariĝus pli kaj pli neregula kaj pruntus grandskale el la angla. Spilante la eltrovojn de esplorado pri kazoj kaj korpusanalizo, la aŭtoroj sugestas ke tiaj prognozoj, manke de subtenaj empiriaj donitaĵoj, ne estas bazitaj je ĝusta pritakso de la realecoj de Esperanto-komunikado kaj estas nenio alia ol spekulativo.

3. La biblioteko de la Universitato Princeton arigas kolekton pri Esperanto kaj interlingvistiko

La 10an de oktobro, profesoroj kaj bibliotekistoj kunvenis en la Biblioteko Firestone por festi donacon de rara libro, la t.n. "Unua Libro," fare de konata esperantisto Humphrey Tonkin al la biblioteko de la Universitato Princeton

La "Unua Libro," eldonita en julio 1887 de la kreinto de Esperanto, Ludwik Zamenhof, estas samtempe enkonduko al la origino kaj idealoj de la lingvo kaj priskribo de ĝia simpla gramatiko (kun ekzemploj el prozo kaj poezio kaj aldonita vortaro de oftaj vortoj). La libro unue aperis en la rusa sub la titolo "Internacia Lingvo de d-ro Esperanto". La donaco de Humphrey estas ekzemplero de la unua pola eldono, eldonita pli poste en la sama jaro.

Grandparte pro la agado de siaj nunaj profesoroj, la Universitato Princeton aspiras fariĝi internacia centro por studado de Esperanto kaj konstruitaj lingvoj. Prof. Esther (Starry) Schor (de la Angla Fako) estas internacia aŭtoritato pri Esperanto kaj aŭtoro de ĝia plej lasta signifa studo *Bridge of Words: Esperanto and the Dream of a Universal Language* (2016); Profesoroj Joshua Katz (Klasikaj Lingvoj) kaj Michael Gordin (Historio) faras esploradon en rilataj kampoj kaj kune instruis popularan bakalaŭran kurson pri konstruitaj lingvoj. Subtene al tiu instruado kaj esplorado, la Biblioteko lastatempe fortigis sian akiron de nunaj kaj retrospektivaj titoloj, el kiuj pluraj estas signife raraj.

(El la plena gazetara komunikado, legebla (kun foto) ĉe <https://library.princeton.edu/news/general/2018-10-11/humphrey-tonkin-gifts-rare-esperanto-book-princeton-university-library>)

4. Konferenco pri Lingvoj kaj la Unua Mondmilito

10-12 Septembro 2018: Londono, Europe House kaj KU Leuven, Campus de Bruselo

Okaze de la centjariĝo de la fino de la Unua Mondmilito kunvenis aro da fakuloj por pridiskuti ĝian lingvan dimension. En tiu kadro Javier Alcalde prezentis kontribuon pri “Pioniroj de internaciismo. Esperanto dum la Unua Mondmilito”. Unue, la prelego enkondukis la lastatempan fakan literaturon pri la Esperanto-movado (Garvía, Gordin, Lins, Schor, Alcalde kaj Salguero ktp). Due, priskribis la kuntekston de la unuaj jardekoj de Esperanto el geopolitika perspektivo, kiam la debato pri helplingvo lokiĝis inter la ĉefaj temoj de la tiama internacia tagordo, kaj ties socia movado akiris la subtenon de interalie Nobel-premiitoj en pluraj fakoj. Trie, montris la fruan aperon de internaciaj E-asocioj tiel diversaj kiel tiuj de fervojistoj, medicinistoj, vegetaranoj, framasonoj, katolikoj, skoltoj kaj pacifistoj. Kvare, detaligis du el la roloj de la Esperantistoj dum la milito: (a) humanan agadon kunlabore kun la Ruĝa Kruco; kaj (b) informan agadon pere de E-publikigaĵoj. Kvine, pridiskutis la sekvojn de la milito por la evoluo de la movado, inkluzive de la morto de ĝia iniciatinto, radikala pacifisto Zamenhof. Fine, menciis novan kuntekston dum la intermilita periodo kun apartaj aventuroj en la Ligo de Nacioj kaj en la laboristaj medioj, kiuj plej klare videblas dum la Hispana Enlanda Milito.

Pliaj informoj: <https://bit.ly/2NfL1U4>

5. Sukcese okazis ronda tavolo pri Esperanto

La 2-4-an de oktobro 2017 en la Ŝtata Universitato de Sankt-Peterburgo (SPBU) okazis la Tria forumo kun la titolo “Rusio kaj Iberameriko en Tutmondiĝanta Mondo: historio kaj perspektivoj” en kiu ĉeestis kelkaj centoj da homoj. Partoprenis registraraj gravuloj de Latinameriko kaj Rusio: diplomatoj, ministroj kaj eĉ eksprezidentoj, profesoroj, universitatanoj, studentoj ktp. Inter la pluraj simpozioj de la programo estis ankaŭ “Esperanto kiel ponto inter Latinameriko kaj Rusio”. Sankt-Peterburga Ŝtata Universitato kune kun Instituto de Latinameriko de Rusia Akademio de Sciencoj elektronikforme aperigis 2695-paĝan libron: *Rusio kaj Ibero-Ameriko en Tutglobiĝanta Mondo: Artikoloj kaj Materialo de la Tria Internacia Forumo*. (Ruse: Россия и Ибероамерика в глобализирующемся мире: история и современность. Доклады и материалы Третьего международного форума. - отв. ред. В.Л. Хейфец, Л.С. Хейфец. - СПб: Скифия-принт, 2017. - ISBN: 978-5-98620-296-9.) Inter forummemuaroj en la rubriko “Esperanto kiel ponto inter Latinameriko kaj Rusio” aperos la sekvaj artikoloj:

1. D. A. Ŝevĉenko: La lingvo Esperanto kiel rimedo de egalrajta komunikado en Interreto en kondiĉoj de tutglobigigo
2. A. O. Striganova: Sperto/Praktiko de la instruado de Esperanto en filologia fakultato
3. M. K. Ĉertilov: BRBĈS: Altaj kulturoj kaj iliaj bezonoj je komunikado [BRBĈS = Brazilo – Rusio – Barato – Ĉinio – Sudafriko].

La artikoloj enhavas resumojn kaj ŝlosilvortojn en la angla kaj la hispana, kaj estos indeksataj en la sistemoj de la scienca citado.

[Noto de D. Ševčenko: “Tio estas la lasta scienca publikaĵo de la forpasinta februare nia kara kolego Mikaelo Ĉertilov. Li partoprenis en la forumo nome de REU.”]

6. Tria Kongreso DiscourseNet DNC3-ALED: Alvoko pri sesiaj proponoj.

Tria Kongreso DiscourseNet DNC3-ALED: Scio kaj potenco en multcentra mondo. Diskursoj trans lingvoj, kulturoj kaj spacoj. 11-14/09/2019, Paris Seine, Université de Cergy-Pontoise, France.

La legitimeco de “Eŭropo” kaj “Okcidento” kiel identigeblaj teritoriaj kaj imagitaj entoj estas en krizo. Okazas kreskanta konscio pri mondo ĉiam pli multcentra. Samtempe, la kampo de Diskursaj Studoj kreskas je blinduma rapideco tra la terglobo. La kampo de Diskursaj Studoj estas konata pro siaj teoriaj orientiĝoj kaj metodikaj iloj kiuj klarigas signifoproduktadon kiel socian praktikon mobilizantan lingvojn, mediojn kaj teknologiojn. Sekve ĝi estas unike lokita por observi kaj analizi ŝanĝiĝantajn konceptojn de postkolonia, post-eŭrocentra, post-okcidento-kaj-cetera mondo. La diversaj komprenoj de la kruciĝo de lingvo kaj socio, en la gamo de specifaj skoloj, teorioj kaj aliroj ene de Diskursaj Studoj promesas inspiri konfliktajn analizojn de la hodiaŭa mondo.

DNC3 - ALED

- estas malferma al diskursoesploristoj el ĉiuj disciplinoj,
- bonvenigas prezentojn en la multaj lingvoj en kiuj oni faras diskursan esploradon hodiaŭ,
- celas krei kaj evoluigi senhierarkiajn kaj malfermajn spacojn por dialogo kaj interŝanĝo.

Pliaj informoj: <https://dnc3.sciencesconf.org/>

7. Voko por referaĵoj: multlingvaj literaturoj

Limdato: 31 decembro 2018. Konferenco: 17-19 Julio 2019, Gregynog Hall, Kimrio.

Multlingva scio iam estis ofta inter la plimulto de verkistoj kiuj elektis sian idiomon laŭ la celo de ilia teksto kaj ĝiaj celataj legantoj. Oni foje argumentas, ke nur kiam venis la nacia ŝtato en la dekoka kaj deknaŭa jarcentoj kune kun sia dependo je unika Sprachgeist (Herder) literatura produktado kupliĝis kun nacia lingvo (Anderson). En la nuna epoko de tutmondiĝo, scio de alia lingvo estas ĉiam pli rara inter angleparolantaj verkistoj, dun en aliaj mondopartoj la kapablo uzi la anglan kiel duan lingvon estas baza scio. En literatura esprimado, trasdukitaj anglaj ĝenroj kaj stiloj minacas forpuŝi denaskajn aŭ patrinlingvajn tradiciojn (Mizumura), dum la angla samtempe ensorbas eksterajn influojn kaj angleparolantaj legantoj evitas tradukojn.

Tiu ĉi konferenco celas esplori diverĝajn tendencojn trans malgrandaj kaj grandaj lingvoj, precipe tiuj kiuj havas establitan ĉeeston en Eŭropo se temas pri individuaj aŭtoroj kaj literaturaj periodoj – ekde la mezepoko ĝis la nuntempo. Proponoj por referaĵoj aŭ sekcioj en lingvoj aliaj ol la angla estas bonvenaj. Ni planas aperigi selekton el la referaĵoj. Ni invitas proponojn pri referaĵoj pri ĉiu temo kiu rilatas la multlingvaj literaturoj trans la literaturaj kaj lingvaj disciplinoj. Temoj povus inkluzivi la jenajn:

- Lingvoelekto kaj potenco
- La translingva kaj ‘denaske tradukita’ (Walkowitz)
- Lingva ŝaltado, pruntado kaj miksado
- **Inventitaj lingvoj**
- Interkultura / lingva perado kaj kultura alproprigo
- La romano ‘Modernaj Lingvoj’
- Literaturaj transmetoj

- Prezentoj de fremdeco, inkluzive aliajn lingvojn
- Kreaj aliroj al reprezento de multlingvismo en poezio kaj fikcio.
- Lingvaj ludoj
- Multlingva verkado

Pliaj informoj:

<http://projects.alc.manchester.ac.uk/cross-language-dynamics> (U of Manchester, Cross-Language Dynamics)

<https://multilingualliteratures.wordpress.com> (konferenco)

8. Studraporta kunsido de Japana Esperanto-Instituto

Dum la 2-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio (105-a Japana Esperanto-Kongreso kaj 50-a Korea Kongreso de Esperanto) en Nara, Japanio, 2018-10-12/14, okazis la tradicia studraporta kunsido de Japana Esperanto-Instituto, ĉi-foje ankaŭ kun raportanto el Koreio. Partoprenis 38 personoj. Okazis kvar stud-raportoj. BAK Giwan el Koreio, gastopreleganto, raportis kun la titolo "Ĉu Tokia Universitato estas la universitato en Tokio?". AIKAWA Takuya raportis kun la titolo "'Korea antologio de noveloj' kaj tradukado de korea literaturo". SASAKI Teruhiro raportis kun la titolo "Praktika filozofio de Mozi – kritika penso kaj utilismo –". KADOJA Hidenori raportis kun la titolo "Kiel oni povas sisteme kompreni la esperant-movadan historion en Japanio dum la faŝisma periodo?". Ĉiuj raportoj okazis en Esperanto. Viglaj opiniinterŝanĝoj estis faritaj ne nur de japanaj ĉeestantoj sed ankaŭ de koreaj kaj ĉinaj ĉeestantoj. HIROTAKA Masaaki kaj KIMURA Goro Christoph (Komitato por Studraporta Kunsido)

9. Kunveno de Israela Tradukista Asocio plene dediĉita al Esperanto

Amri Wandel, Prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo, raportas:

“La 28an de oktobro okazis en Tel-Avivo kunveno de la Israela Tradukista Asocio (ITA), kiu estis plene dediĉita al Esperanto (https://ita.org.il/?page_id=728&lang=en), kiun partoprenis ĉ. 50 personoj. Mi rakontis pri kio estas E-o kiel ĝi evoluis, kaj kion eblas fari per ĝi, kun aparta emfazo pri literaturo kaj tradukoj. Tali [filino] rakontis pri pri denaskuloj kaj kiel ŝi perceptas la lingvon, kreskinta kun E-o kiel patrolingvo. Sekve ŝi rakontis pri eŭritmio kaj eŭritmia koreografio en Esperanto, kaj prezentis mallongan eŭritmian dancon laŭ originala E-teksto. Post la vespermanĝo mi faris koncizan lecionon de E-o, por demonstri kiel lingvo povas esti simpla kaj facila, sed samtempe riĉa, esprimiva kaj fleksebla. Mi invitis la aŭskultantojn viziti la Tel-Avivan klubon, kaj eĉ la Israelan Kongreson en aprilo, post ioma lernado de E-o rete aŭ en la komencanta kurso en Tel-Avivo, planata komence de 2019. Estis bonaj reagoj, oni aĉetis kelkajn E-librojn, aparte la E-tradukon de Amos Oz. Oni publikigis fotojn kaj reagojn pri la evento en la Facebook-paĝo de la Tradukista Asocio, kiu dum kelkaj tagoj antaŭ la evento afiŝis multe pri Esperanto: <https://www.facebook.com/IsraelTranslatorsAssociation>”.

10. Prof. Ilona Koutny ricevis la 16an FAME-Premion

La 20-an de oktobro 2018 la urbestro de la urbo Aalen, Thilo Rentschler, kune kun Andreas Emmerich, la prezidanto de FAME-fondaĵo, transdonis al prof. d-rino hab. Ilona Koutny la renomatan kulturpremion de la Fondaĵo Alois Meiners. La premio estas dotita per 3.000 eŭroj kaj ĝin rajtas ricevi personoj aŭ organizaĵoj, kiuj akiris al si meritojn rilate la antaŭenigon de la internacia interkompreniĝo.

La urbestro en urbodoma feste ornamita salono tre varme bonvenigis la premiatan prof-inon Koutny kaj ŝian koleginon, d-rinon Katalin Kováts, kiu antaŭ du jaroj ricevis la FAME-premion. Li aplaŭdite de la

ĉeestantoj diris kelkajn vortojn en Esperanto. Rentschler aprezis la laboron por kaj per Esperanto kiel subtenindan kontribuon por la internacia kompreniĝo kaj la venko de lingvaj baroj.

La laŭdparoladon faris Peter Zilvar, la gvidanto de Germana Esperanto-Centro en Herzberg/Harcmontaro. Li estas mem unu el studintoj ĉe la premiitino. Zilvar emfazis, ke la premiitino dediĉis 30 jarojn al la instruado de interlingvistiko kaj esperantologio. Li substrekis ŝian sciencan multflankecon, menciante ŝiajn laborojn koncerne parolsintezon kaj pretigon de vortaroj. Kiel grandan meriton de Ilona Koutny Zilvar elstarigis la fondon de la Interlingvistikaj Studoj kaj ties sindonan daŭran gvidadon dum 20 jaroj ĉe la universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando. La eksteraj 6 semestraj postdiplomaj studoj ĉefe koncernas ĝeneralan kaj aplikatan lingvistikon, internaciajn lingvojn kaj interkulturan komunikadon, koncentriĝas al la lingvistiko, literaturo kaj historio de Esperanto.

Horst Vogt

Pliaj informoj:

- Raporto pri la FAME-premio: <https://edukado.net/novajhoj?id=765>
- Raporto pri la lasta interlingvistika sesio: : <https://edukado.net/novajhoj?id=762>
- Prelego de IK pri kulturo dum Arkones:
<https://www.youtube.com/watch?v=xokbMbmF6As&t=131s>
- Prelego de IK pri la universitata instruado de esperantologio k interlingvistiko en Madrido:
<https://www.youtube.com/watch?v=U2gbboE9tdQ&feature=youtu.be>

11. Dek jaroj da Esperanto en filozofia fakultato de Zagrebo

Dum la vintra semestro de la akademia jaro 2017/18 kiel parto de instruoferto de la elekteblaj kursoj en la Germana Fakto de la Filozofia Fakultato de la Zagreba Universitato estis instruataj du studobjektoj: planlingvoj kaj interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto. Planlingvoj estis la unuan fojon instruata en la akademia jaro 2007/2008 kaj Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto en 2008/2009 kadre de tiutempe enkondukitaj novaj studprogramoj kreitaj laŭ la principoj de la tiel nomata bulonja reformo. La studobjekto planlingvoj estis instruata en la germana lingvo al 35 bakalaŭraj studentoj de la germana lingvo kaj literaturo. La kroatlingvan studobjekton Interlingvistiko kaj Strukturo de Esperanto partoprenis kvar magistras studentoj de la Filozofia fakultato, kiuj studas aliajn fakojn kaj ne germanan lingvon kaj literaturon. Por la akademia jaro 2018/19 estas antaŭvidate, ke en la vintra kaj en la somera semestroj estu ofertata la studobjekto Planlingvoj, dum Interlingvistiko kaj Strukturo de Esperanto en tiu akademia jaro ne estos instruata.

12. Esperanto-kurso en la Universitato de Kostariko

La Fakaro pri Filologio, Lingvistiko kaj Literaturo de la Universitato de Kostariko okazigas ĉiusemajnan trihoran Esperanto-kurson kiel elekteblan studobjekton dum la dua semestro de 2018 (valoras tri poentojn). En la kurso enskribiĝis 30 gestudentoj entute. Tiu ĉi kurso ekzistas jam de ĉirkaŭ 26 jaroj. Nuntempe Prof. Jorge Antonio Leoni de León gvidas ĝin.

13. Premioj de Fondaĵo Antoni Grabowski

La Fondaĵo Antoni Grabowski (FAG) estis kreita sur la bazo de grandanima donaco de Adam Goralski (1912–2005). Ĝia regularo estis novformulita en 2017. La fondaĵo, portanta la nomon de “la patro de la Esperanta poezio” Antoni Grabowski, celas subteni la Esperantan kulturon per premioj kaj subvencioj. La ĵurio de FAG, kiu de 1984 aljuĝas premiojn ĉiun duan aŭ trian jaron, nun konsistas el Ulrich Lins, Shi

Chengtai kaj István Ertl. La administradon de la Fondaĵo prizorgas la Centra Oficejo de UEA. En la Lisbona UK estis anoncigitaj la ĉi-jaraj premioj de Fondaĵo Antoni Grabowski.

La unua premio (750 us. dolaroj) iras al Sten Johansson (Svedio). Li ricevas ĝin pro sia elstara kontribuado al la literaturo de Esperanto. Unue tradukinte en Esperanton el la sveda (ekde 1982), li de 1986 verkis imponan kvanton da prozo originale en Esperanto kun vasta gamo de temoj. Inter ili estas facillingvaj krimromanetoj, sed ankaŭ romanoj pli ampleksaj (laste, *Marina ĉe la limo*), kiuj trovis multe da sukceso pro sia stilo, ofte ironia aŭ humura. Pluraj liaj verkoj estis premiitaj en Belartaj Konkursoj. En 2000 li kreis retejon pri Originala Literaturo Esperanta (OLE), kiu kreskis al granda sciobanko pri aŭtoroj kaj verkoj, inkl. de 1600 recenzoj. Johansson tradukis krome verkojn de Virginia Woolf. UEA distingis lin en 2014 per “Diplomo pro elstara arta agado”.

La duan premion (400 us. dolaroj) ricevas Gonçalo Neves (Portugalia) kaj Bernhard Pabst (Germanio) pro sia komune kompilita Historia vortaro de Esperanto 1887–1889. Tio estas konkordanco, kiu notas ĉiun unuan uzon de vorto en la komenc-tempa epoko de Esperanto; iniciatis ĝin Reinhard Haupenthal. Ambaŭ honoritoj aktivis ankaŭ alikampe (Neves ĉi-jare per la kolektoj Periskope kaj Recenze), sed la premio celas esprimi laŭdon al ili pro la (daŭranta) projekto dokumenti la originon de la lingvo Esperanto.

La ĵurio gratulas la tri ĉi-jarajn premiitojn kaj ĝoje notas, ke en 2018 ni festas la centan datrevenon de la apero de Sinjoro Tadeo de Adam Mickiewicz, nome de la Esperanta traduko farita de Antoni Grabowski (<https://eduinf.waw.pl/esp/lern/librejo/0006/0000.php>).

(laŭ *Gazetara Komunikado de UEA*)

14. Parolado TEDx (Romo, 2018) pri Esperanto

“The Transformative Vision of Esperanto” (La transformata vizio de Esperanto) estis la titolo de parolado TEDx prezentita en Romo de estrarano de ESF Esther Schor, usona poeto, aŭtoro, kaj Profesoro Behrman en la Konsilio pri Humanaj Studoj de la Universitato Princeton: <https://youtu.be/ZsHQck46lvI>

15. Katalogo de Esperantaĵoj haveblas rete

Roland Rotsaert skribas: “En la Fondaĵo Vanbiervliet troviĝas (kiel en aliaj bibliotekoj) multaj aferoj kiuj estas nek libroj, nek revuoj, kaj estas pro sia diverseco malfacile katalogeblaj: flagoj, afiŝoj, insignoj... Ĉar mi mem ne trovis taŭgan programon, mi fine de la pasinta jaro faris alvokon en la landa E-revuo. Reage al tio Albert Claesen proponis krei datumbazon por tiuj objektoj. Post pli ol duonjaro da laboro, ni opinias, ke indas montri la datumbazon al la publiko, kvankam ĝi tute ne estas finpreta. La priskriboj estu dulingvaj (NL-EO), sed estas nun nur unu lingvo; iuj bildoj estas malbonkvalitaj; pro la granda kvantoj kelkaj serioj estas ne aparte priskribitaj sed grupigitaj en albumoj, iuj serioj ankoraŭ parte aŭ tute mankas (vinjetoj, fotoj, poŝtkartoj)... Tamen por esplorantoj ĝi jam nun utilas, ekzemple ĉar enestas pluraj objektoj pri aranĝoj en iama Sovietio nun tute forgesitaj. Ekde nun kaj dum kelkaj semajnoj la datumbazo konsulteblas je <http://archivo.alcl.be>.

16. 50 jaroj da elstara agado: honorigo de ESF

Dum la fermo de la UK en Lisbono, UEA speciale honorigis ESF-on pro 50 jaroj da elstara agado. Fondita en 1968, ESF (en la angla: Esperantic Studies Foundation) celas antaŭenigi lingvan justecon kaj lingvan komunikadon, kun speciala atento al Esperanto. Pro ĝiaj grandaj kontribuoj al la movado, precipe en la lastaj dudek jaroj, la Prezidanto de UEA petis la ĉeestantajn estraranojn kaj kunlaborantojn de ESF veni sur la podion por ricevi la aplaŭdojn de la publiko.

Trezoro Huang Yinbao, UEA-estrarano kaj la redaktoro de la Esperanta eldono de *Unesko-kuriero*, speciale dankis al ESF pro la subteno de kernaj agadoj kaj servoj de UEA, kiel la Biblioteko Hodler, la Katedro pri Esperanto kaj Interlingvistiko ĉe la Universitato de Amsterdamo, kaj *Unesko-kuriero* mem. Trezoro menciis, ke UEA plurfoje donis Diplomojn pro Elstara Agado al projektoj kaj homoj, kiujn ESF finance subtenis. “Hodiaŭ ni volas honori la fondaĵon mem, kiu donis la bazon por tiom da valoraj projektoj. La literoj ESF povas havi multajn signifojn. Mi proponas, ke plej trafe, ESF devas signifi ‘Elstare Sukcesa Financado’.”

Humphrey Tonkin, kunfondinto kaj la nuna prezidanto de ESF, rimarkis, ke zorga kaj konservema traktado de la financaj rimedoj ebligis, ke hodiaŭ per la fruktoj de tiu kapitalo, ESF povas disdoni preskaŭ kvaronmilionon da dolaroj en diversspecaj subvencioj ĉiujare. Li ankaŭ rimarkis ke ĝuste nun, sojle al la 75-jara datreveno de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj, la demando pri lingva justeco fariĝas pli kaj pli brula. D-ro Tonkin substrekis, ke la sukceso de ESF ne estus ebla sen la kapitalo malantaŭ ĝi, kaj invitis la ĉeestantojn subteni per donacoj kaj UEA-n, kaj ESF-on, kaj ideale ambaŭ, “ĉar mono ebligas sukceson. Do, al la venontaj 150 jaroj da sukceso!”

Pliaj informoj: esperantic.org kaj Gaz. Komunikoj de UEA

17. ESF nomis novan kunordiganton de universitataj aferoj

ESF anoncis enoficigon de nova kunordiganto de universitataj aferoj kiel posteulo de Asya Pereltsvaig, kiu retiriĝis el tiu posteno fine de 2017. La nova kunordiganto estos Angela Tellier, el Britio. Ŝi havos respondecon ligi kontaktojn kun universitatoj kaj aliaj fakuloj kiuj okupiĝas pri Esperanto kaj interlingvistiko ĉu kiel instruantoj ĉu kiel esplorantoj, ne nur en Norda Ameriko sed ankaŭ tra la tuta mondo. La celo de ŝia rolo estos intensigi la kunlaboron sur tiu tereno nacie kaj internacie. Ŝi samtempe rolos kiel kunordiganto de universitata agado por CED.

D-rino Tellier estas post-doktoriĝa esploristo ĉe la Universitato de Essex, kaj honora fratulo de la Universitato de Liverpolo, kie ŝi kunordigas la lektoraton Buchanan. Ŝi interesiĝas pri la propedeŭtika rolo de Esperanto kaj ĝia efiko sur la evoluo de metalingva konscio ĉe infanoj; tiukampe, ŝi multon publikigis. Interalie, ŝi kunordigis la kvinjaran britan enlernejan esplorprojekton “Springboard to Languages”. Ŝi ankaŭ interesiĝas pri la vivo kaj verkoj de nebone konataj Esperantistoj, kiuj grave influis la mondon: ŝi nun verkas biografion pri la interlingvisto Profesoro William Collinson.

18. ESF kunvenigis simpozion pri Esperanto kaj interlingvistiko

Instruado kaj esplorado pri Esperanto kaj interlingvistiko floras en universitatoj tra la mondo, sed nepras pli da kunordigo kaj integriĝo en kernajn kursojn. Jen la ĝenerala konkludo de la lastatempa Nitobe-simpozio organizita de ESF en Lisbono, Portugalio, la 4-an kaj 5-an de aŭgusto. La Simpozio, kiu kunvenigis kvindek da invititaj profesoroj kaj esploristoj el dudeko da landoj, proponis apartajn enrigardojn en kursojn kaj programojn en universitatoj en Pollando, Germanio, Usono, Hispanio, Kostariko kaj Barato, kaj ĝi alfrontis problemojn kiel ekzemple la bezonon de pli da lernolibroj kiuj pli larĝe pritraktas la temon. Aliaj notitaj problemoj estis la graveco krei kontinuecon en ekzistantaj programoj, kaj manieroj plivastigi la proponadon de kursoj al pli da universitatoj.

Pliaj informoj kaj simpoziaj dokumentoj: <https://www.esperantic.org/eo/2018/09/04/esf-okazigis-simpozion-pri-esperanto-kaj-interlingvistiko/>

19. ILEI raportas

Kongresoj :

- La 51-a ILEI-kongreso en Madrido, Hispanio: sukcesa, absolute rekorda laŭ la kvanto de aliĝintoj kaj partoprenintoj kaj novtipa pro unuigo de du kongresoj samtempe.
- La 52-a ILEI-kongreso okazos en Ĉaĉak, Serbio, en julio 2019
- La Estraro dense esploras pri la loko por la 53-a ILEI-kongreso en 2020 kaj pri la eventualaj temoj, allogaj por ILEI kaj por universitata medio.

Komisiono pri universitata agado

Post la ILEI-kongreso en Madrido kaj la Nitobe-simpozio en Lisbono aperis nova konsisto de la Komisiono pri Universitata Agado de ILEI. Aldoniĝis D-ro Vicente Manzano Arrondo, profesoro pri psikologio en la universitato de Sevilla, Hispanio. Li estis efike aktiva dum la madrida kongreso kaj la lisbona simpozio.

EIT – Esperanto-Instruista Trejnado

Vidante la bezonojn kaj konstatante la novajn teknikajn eblojn, ILEI en 2018 okazigis/as du programojn EIT. Ambaŭ enhavis la samajn partojn : retan kurson ĉe www.edukado.net kaj ĉeestan semajnon. La unua okazis bone kaj finiĝis en Madrido okaze de nia 51-a Kongreso. La dua estas destinita por Afriko, sed renkontis diversajn teknikajn problemojn, kiujn ILEI nun klopodas solvi. De tiu grupo restas ses instruistoj.

Septembre la Prezidantino Mireille Grosjean dissendis tra kanaloj de ILEI alvokon pri la planata unua sesio de KER-ekzamenoj en Afriko, en Kotonuo, Benino, la 5-an de novembro 2018. Tio estas komuna projekto de ILEI kaj de la Komisiono pri Ekzamenoj de UEA cele al kapabligo de afrikaj samideanoj.

Komisionoj, sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj

Dum la ILEI-kongreso en Madrido la Komitato akceptis du novajn sekciojn: en Senegalo kaj en Armenio.

Internacia Pedagogia Revuo (IPR)

Ĉijare ILEI kunlabore kun LIBE – la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj – decidis krei adekvatan formaton de IPR kaj JA por blinduloj. La redaktoroj, Jozefo Nemeth kaj Sebastian Cyprych, la ILEI komisiito pri membroprizorgado, pretigis taŭgan formaton. Reago de LIBE-anoj alvenis tute pozitive.

Juna Amiko (JA)

Dum la ILEI-kongreso en Madrido kreiĝis laborgrupo por trakti diversajn aspektojn de la revuo: la deficiton de la papera versio, kaj nivelon de la lingvo, por ke ĝi pli bone trafu sian celpublikon – Esperanto-lernantojn, komencantojn de ĉiu aĝo, kiuj bezonas facilan, kompreneblan lingvon. La laboro komenciĝis perrete aŭtune.

ILEI-kongreso en 2019

Ĝi okazos ĉe la Fakultato pri teknikaj sciencoj en Ĉaĉak, Serbio (parto de la Universitato de Kragujevac). La kongreso temo estos lernado en virtualaj komunumoj. Tiu temo ebligos konsideron de la Internacia Jaro de la Indiĝenaj Lingvoj lanĉita de Unuiĝintaj Nacioj kaj plenumita de UNESKO.

(Raportis Sekretario de ILEI: Elena Nadikova; Prezidanto de ILEI: Mireille Grosjean)

20. Por deca hejmo de DEC – Dokumenta Esperanto-Centro en Zagrebo

